La senatano priparolis iniciaton nuntempan ĉe la pola Ministerio pri Kulturo kaj la Nacia Heredaĵo starigi liston de ne-materijaj mondheredaĵoj kun la ideo, ke Esperanto eniru tiun liston. Se tio sukcesos, imageblas, ke la koncepto disvastiĝu al aliaj landoj de Centra Eŭropo, unuavice ĉe la Visegrada landkvaropo. Li daŭrigis: “Pri lingva evoluigo, ni devas havi internacian aliron. Estus tre malfacile enkonduki novan devigan lingvon en nian eduk-sistemon, sed malpli formalaj ebloj devas ekzisti. Por realisme esplori eblojn, ni devus scii proksimume kiom da parolantoj de Esperanto ekzistas en Pollando kaj en la mondo – tio estus nia komencpunkto.

Fine, ni volas aranĝi ke la nuna ekspozicio kiu staras en la pola senatejo transiru iam al la sidejo de la Eŭropa Parlamento.

Laste alveninta informo

ESPERANTO sur la pola listo de Nemateria Kultura Heredaĵo

Estimataj! Permesu anonci la epokan novaĵon de pola esperantistaro, kiu danke al la intensa kunlaboro kun Polaj Parlamentanoj de la Parlamenta Grupo Subtenanta Esperanton (PGSE), Polaj Esperanto-Organizaĵoj, Pola Instituto de Nacia Kultura Heredaĵo pere de ĝia Ministro, S-ro Bogdan Zdrojewski, kaj fine kun helpo de landaj kaj eksterlandaj eminentaj Sponsoroj, ni ĝisvivis la honoron ricevi aproban subskribon de Pola Ministro pri Kulturo kaj Nacia Heredaĵo, kiu ebligis lokigi ESPERANTON sur Polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.

La sukcesa evento, iniciatita de la prezidanto de PGSE, eminenta pola senatano prof. d-ro habil. Edmund Wittbrodt kaj eminenta Honora Membro de Pola Asocio Eŭropo - Demokratio - Esperanto - Kazimierz Krzyżak, ebligas tio estonte proponi ESPERANTON sur la Rezentativan Unesko-

Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo de la Homaro.

Kiel pola deponanto de la lingvo Esperanto kaj ĝia kulturo, mi petas redaktorojn de Esperantogazetoj, -portaloj, -radioj kaj -televidoj, disvastigi tutmonde la historian eventon pri enlistigo de Esperanto, la 20-an de novembro 2014, sur Polan Liston de Nemateria Kultura Heredaĵo.

Kun vortoj de espero kaj internacia amikeco - Jerzy Antoni Walaszek - prezidanto de Pola Asocio Eŭropo - Demokratio - Esperanto (EDE-Pollando)



La emblemoj por la mondheredaĵoj: maldekstre por la materiaj kaj dekstre por la ne-materiaj heredaĵoj.



Interesa esperanto-renkontiĝo en Brandbergen

En septembro okazis en Brandbergen interesa prelego pri Tove Jansson, kiu ĉi tiun jaron celebras 100-jaran datrevenon de sia naskiĝo. Saliko (Raita Pyhälä, el Finnlando) venis prelegi. Dum la somero ŝi prelegis pri Tove Jansson en BET 50 en Rigo kaj dum jubilea kunveno en Helsinko. Ŝia artikolo pri Tove Jansson aperis en Zagreba Esperantisto.

La prelego en Brandbergen kolektis kvardekonon da aŭskultantoj, inter ili 5 esperantistoj el

Stockholm. La ĉefino de "Seniorcentro" faris grandan laboron por reklami pri la prelego per afiŝoj, anonco en loka gazeto instigi homojn veni. La salono estis plena. La etoso estis bona. La ĉefino Maud metis grandajn bildojn sur muro pri artaĵoj de Tove Jansson, kiu ne nur estis patrino de Mumin-troj, sed ankaŭ fama artisto. Iu kolektis Mumin-bildojn kaj faris etan ekspozicion.

Tre grave estis, ke multaj kunlaboris en la efektiviĝo de la evento. Svedlingva finnino, kiu loĝas en Brandbergen, laŭtleĝis el la libro "Vem ska trösta Knyttet". Mi legis ĉitaĵojn el memolibro, kiun Tove Jansson verkis pri sia infanaĝo "Bildhuggarens dotter". Saliko konigis al ni plurajn flankojn de Tove Jansson, kiujn plej multaj en la publiko ne konis. Mi interpretis la prelegon kaj ĝuis, ke mi ankoraŭ kapablas tion fari, kion mi antaŭ jaroj ofte faris kaj tre ĝuis.

Post la prelego ni kun Roland Lindblom vojaĝis al la biblioteko en Västerhaninge, kie okazis ekspozicio pri Tove Jansson kaj pri ŝiaj Mumin-libroj kun demandoj por respondi. Saliko gajnis premion per siaj respondoj kaj ricevis libron.

Postan semajnon ni vojaĝis per Hurtigruten en Norvegio. Tiam ni faris multan informadon pri esperanto. Ni parolis kun la respondanto pri kulturo sur la ŝipo. Krome li multe interesiĝis pri lingvoj kaj mem konis plurajn. Mi proponis, ke li kontaktu UEA por havigi materialon pri esperanto en diversaj lingvoj – eble ankaŭ lernomaterialon, ĉar troviĝis kolektoj da libroj en diversaj "ĉambroj" surŝipe. Ĉu la Hurtigruten-ŝipo "Midnattsol" fariĝos esperanto-ŝipo?

Septembro 2014
Kerstin Rohdin



Salutoj de niaj tutmondaj samideanoj

Nia tria KERO 2014, tutlanda E-renkontiĝo, okazis en bela najbara provinco Pinar del Rio, ĉe Valo de Viñales, ĝuste en kampadejo Dos Hermanas (Du Fratinoj), situanta 145 km okcidente de nia ĉefurbo, Havano. Tie ariĝis 134 partoprenantoj el preskaŭ la tuta lando.

Dum tri tagoj (12 – 16 marto) okazis diversaj E-aranĝoj: la 30-a komitatkunsido de KEA, la balotado por nova mandato 2014 -2017 de KEA-estraro, la KEA-ekzamenoj (baza kaj meza), funkciis la radiostacio *Papilio* ĉiutage dum 15 minutoj, ekskursoj (padumado al la Valo, al Belvidejo *Los Jazmines*), didaktaj ludoj, la metiejo pri tradukado, libroservo, origamio, radioamatorismo, retrokurado, sorobano, tabul-ludoj, interaliaj aranĝoj.

Ĉiuvespere estis arta vespero, kie koncertis la repa duopo *Fratoj El* kaj la grupo *Amindaj*, ambaŭ el orienta provinco Santiago de Cuba.

Mi trapasis sukcese la mezan ekzamenon kun mencio "*tre bone*".

En la Valo de Viñales troviĝas kavernoj, kelkaj el ili estas longaj dekojn da kilometroj. La montoj de Viñales estas deklarita *Kultura Natura Heredaĵo de la Homaro*, flanke de Unesko ekde 1999, pro la belegaj pejzaĝoj kaj la konservado de antikvaj laborformoj en la kamparo. Je malmultaj metroj de la kampadejo situas juvelo de la arta esprimo regiona, nome, la Murpentraĵo de la Prahistorio.

Oni jam ekpensis pri la venontjara KERO okazonta en la orienta urbo Santiago de Cuba, povas esti, ke ĝi iĝos nia E-kongreso nacia.

Juan Carlos Montero Medina
Havano

Kuba Esperanto-Renkontiĝo



Esperanto kaj la baloto

Kutime parlamenta baloto havas nenian ajn rilaton aŭ influon al esperanto en Svedio. Ĉifoje tamen ekzistas motivo por iom pripensi la situacion. Unuafoje – almenaŭ unuafoje dum tre tre multaj jardekoj – iu partio atentis pri esperanto dum la elekta kampanjo. Miljöprietiekstis lokis sur sian hejmpaĝon esperantotekston unualoke post la signolingvo kaj antaŭ la alfabeto ordo de ceteraj lingvoj.

Unue ni demandu nin, kiuj povus esti la kaŭzoj kaj motivoj de tio. Nu, jam dekomence esperanto vekis interesiĝon en Miljöprietiekstis, ni memoru ekz. pri Per Garthon kaj lia propono, ke EU demokrate decidu pri uzado de la latina, esperanto aŭ iu alia lingvo. Do, esperanto estis jam konata de la aktivaj Miljöprietiekstis. Due, ĉifoje ĉiuj partioj sentis bezonon kiom eble diferencigi sin ideologie disde la naciismo de Sverigedemokraterna kaj en Miljöprietiekstis malpli da inhibicioj por uzi esperanton en tio. Laste, sed ne malplej

grave, la gvidantaro ĝustatempe ricevis sugeston elekstere, nome de la Esperanta Civito per la Esperanta Naturamikaro en Malago, Hispanio, kun apogo de membroj de la verda listo. Krome, tiu sugesto laŭ nuntempe kutima terminologio estis "raŭmismo", nome ĝion ofertis, ne postulis.

Nun ni demandu nin, kiujn sekvojn la nuna situacio povus havi favore al esperanto. Gravas, ke ni komprenu, kion tio ĉi nur signifas. Ĝi signifas nur, ke en Miljöprietiekstis uzo de esperanto gajnis iom pli da legitimeco ol antaŭe, nenio alia. Oni ne kredu, ke la nova registaro pretas entuziasme prezenti iun esperantofavoran proponon al la parlamento. Male, se tio okazus, esperanto povus rapide perdi tiun gajnon de plia legitimeco, kiun ĝi atingis.

Aliflanke, jam ekzistas eblecoj por saĝe kaj laŭeble eluzi la favoran situacion. Por realigo de almenaŭ unu el tiuj eblecoj necesas aliĝo de iu el la svedaj e-organizoj al la pakto por la Esperanta Civito.

Aŭ kreo de iu nova organizo, kiu pretas je tio. Tio siavice postulas, ke almenaŭ iuj svedlandaj esperantistoj pretas akcepti esperanton ne nur kiel internacian sed ankaŭ kiel popolan kaj transnacion lingvon, kaj jen la problemoj, ĉar la sveda esperantistaro ŝajnas ĝenerale neinformita kaj pri la Esperanta Civito kaj pri la diverspeco en la esperantisma idearo, ĉar apartenanta al alia esperantisma tradicio. Aŭ kiel iu SEJU-membro iam diris al mi:

Ankaŭ Esperantio havas subkulturojn.

Bertil Nilsson



Europeiska språkdagen i Europahuset i Stockholm

Den europeiska språkdagen, instiftad av EU-kommissionen för att främja språkinläring och flerspråkighet, infaller den 26 september och firas inte bara i Europa utan även på många platser runt om i världen. I likhet med de senaste åren hölls ett språkcafé i Europahuset i Stockholm, men i år den 30 september för att inte krocka med bokmässan i Göteborg. Språkcaféet anordnas för skolungdomar från årskurs 7 i grundskolan till årskurs 3 i gymnasiet och innebär en möjlighet att prova på och lära sig mer om språk utöver de som brukar undervisas i skolan.

Esperantoförbundet medverkade även i år, Olof Pettersson från SEF tillsammans med Fanny Tjäder och Tatu Lehtilä från Stockholmsklubben.

Text och bild
Olof Pettersson

På övre bilden syns Tatu Lehtilä informera en besökare



”Dank’ al esperanto”



”**D**ank’ al esperanto”. Tiun frazon plurfoje eldiris Ryszard Turowski kiam mi parolis kun li okaze de lia 80-a datreveno la 15-an de oktobro 2014.

La unuan fojon li vidis la vortojn ”esperanto” kaj ”Zamenhof” estis kiam li kiel 13- aŭ 14-jarulo rimarkis la skribon sur ŝtono, kiun li iam kaj tiam preterpasis survoje al la lernejo en Jelenia Gora, urbo en sudokcidenta Pollando.

Iam dum la 1950-aj jaroj li ekvidis esperantan vortaron en la fenestro de librovendejo en Wroc-



law, kie li studis inter alie filologion. Ĉar li estas libroŝatanto li aĉetis ĝin kaj trafoliumis ĝin, sed poste metis ĝin en la librobretaron kaj forgesis pri ĝi.

Nur je la tria renkonto li vere malkovris esperanton. ”Tredje gängen gillt”, kiel ni diras en la sveda. En 1968 Ryszard laboris kiel ĵurnalisto en Wałbrzych, urbo en sudokcidenta Pollando. Li ricevis la taskon partopreni la inaŭguron de memorŝtono pri esperanto en proksima urbeto kaj skribi artikolon pri la evento. Li tion faris. La lingvo kaj la ideo pri paca kunvivado kaj egaleco de ĉiuj homoj kaptis lin, kiu jam de sia junaĝo klopodis labori por la bono de ĉiuj homoj. Li partoprenis kurson, fariĝis membro de la loka esperantoklubo kaj tuj komencis verki, kaj poezion kaj prozon. Norda Prismo publikigis lian verkon ”Al la frato”, kiun li skribis okaze de la soveta invado de Ĉeĥoslovakio.

Pro liaj ideoj kaj politikaj opinioj oni malpermesis lin labori kiel ĵurnalisto en Wałbrzych, kaj 1969 li transloĝiĝis al Świnoujście kun sia familio. Li fariĝis prezidanto de la loka klubo, gvidis kursojn, estis delegito de UEA

En 1970, survoje al ”Esperanto Renkontiĝo” en Szczecin, li ekvidis viron kun verda stelo kaj alparolis lin. Estis Stig Arne Jacobsson el Skövde kiu ankaŭ estis survoje al tiu renkontiĝo. Ili fariĝis tre bonaj amikoj kaj tenis la kontakton per leteroj.

En 1971 Ryszard invitis al si Stig Arne’n kaj aliajn esperantistojn de Skövde kaj en 1973 ili reciprokis la inviton. Kiam li venis al Svedio li decidis transfuĝi (hop-pa av) kaj resti en Skövde. Tiam, li diris, li la unuan fojon en sia vivo sentis sin kiel liberan homon.

Sekvis pli ol du-jara batalo por venigi la edzinon kaj la du filojn al Svedio. Li montris al mi plurajn eltondaĵojn el lokaj, regionaj kaj tutlandaj ĵurnaloj. Li eĉ skribis al Olof Palme kaj renkontis lin persone. Ĉiuj streboj estis sen rezulto ĝis kiam li petis, kaj ricevis, permeson de la stokholma polico fari manifestacion antaŭ la pola ambasadejo dum Kristnasko 1975. Subite, komence de novembro, la edzino ricevis ordonon de la polaj aŭtoritatoj kolekti sian pasporton kaj prepari sin kaj la infanojn por vojaĝi al Svedio. Sed ŝi kaj la edzo devis esti tre silentaj pri la afero kaj ne informi la gazetaron. Tamen, dum la sekvaj semajnoj en gazetoj kaj ĵurnaloj aperis pluraj artikoloj pri la feliĉa familio kaj ĝia unua Kristnasko en Svedio. Poste ili ne povis viziti Pollandon dum 14 jaroj, ĝis la ŝanĝiĝo de la reĝimo al parlamenta demokratio.

En Skövde Ryszard inter alie laboris ĉe Volvo, havis propran entreprenon, verkis artikolojn por diversaj ĵurnaloj, laboris kiel interpretisto kaj instruis esperanton en lernejoj. Li fakte en Gdansk diplomigis kiel instruisto de esperanto kaj rajtas instrui en diversspecaj lernejoj en Pollando. Li estis delegito de UEA, aktivis en la esperantoklubo de Skövde kaj fariĝis ĝia prezidanto en 1976.

Kiam li kun la familio en 1985 vizitis Helsingborg’ on ili tuj ekŝatis la urbon kaj decidis transloĝiĝi ĉi-tien. Ryszard estis membro de la helsingborga klubo kaj delegito de UEA dum multaj jaroj, sed nuntempe ne aktivis en la esperantomovado, kvankam li ankoraŭ en la koro estas esperantisto. Li havas plurajn aliajn interesojn, legas multon kaj tenas kontakton kun geamikoj ĉirkaŭ la mondo.

*Ann-Louise Åkerlund
Helsingborg*

Bytt adress?

Glöm inte att göra adressändring till medlemsregistret om du flyttat. Tyvärr kommer flera tidningar i retur. Kontaktpuppgifter finns på sidan 2 i denna tidning.

”SPRINGBOARD TO LANGUAGES”

Bakgrund till studien ”Språngbräda till språk” är situationen i engelska skolor beträffande språkstudier på låg- och mellanstadiet. [Observera: Skottland har sitt eget skol-system.]

Resultaten i franska, spanska etc. har länge varit svaga, delvis beroende på att läroplanen av-sätter få timmar till språkstudier (oftast mindre än 1 veckotimme). Tanken har då uppkommit att man skulle kunna förbättra resultaten genom att låta elever lära sig **esperanto som ett förberedande språk** (*starter language*). Studien ägde rum 2006 – 2011. Tre skolor deltog. (Skolorna är ej namngivna i rapporten utan kallas Skola A, B resp. C. Skola A beskrivs som en skola i en förort till en storstad, Skola B som en skola i norra England [förmodligen i ett mindre samhälle] och Skola C, som också betecknas som en förortsskola). De yngsta av de deltagande eleverna har varit 7 år, de äldsta 11 år.

Resultaten sägs ha varit speciellt uppmuntrande beträffande elever med mindre goda förutsättningar att lära sig språk (*lower-ability learners*).

Exempel på testuppgifter:

- översättning av enstaka ord och meningar från det främmande språket till engelska


- förmåga att känna igen ordsläktingar i olika språk
- förmåga att para ihop meningar med samma betydelse i olika språk
- känna igen singular- och pluralformer i olika språk

Studien gav vid handen, att elever som deltagit i försöksverksamheten utvecklat bättre språkkänsla än de som inte gjort det. Man kan dock inte hävda att just esperanto bidragit till det relativt goda resultatet; samma resultat skulle kunna ha uppnåtts även med andra språk.

Elever som deltagit uppvisade en allmänt positiv attityd till människor som talar ett annat språk än engelska, i synnerhet om de fått delta i utbyte med skola i annat land (Tyskland och Ungern). De trivdes allmänt sett med språklektionerna och ville gärna lära sig fler språk. Frågan om de tyckte att de hade lärt sig mycket på lektionerna besvarades ofta med ”vet ej”. Detta gäller även för de elever som också fått lära sig franska och/eller spanska.

Det går sammanfattningsvis **inte** att hävda att projektet haft avgörande betydelse för elevernas språkprestationer. Deltagande lärare var överlag positiva till studien.

Folke Wedlin,
Sveda Esperanto-Instituto



Esperanto as a Starter Language,
edited by Angela Tellier 2013

Tidigare dokumenterade studier

(Källa: <http://www.springboard2languages.org/>)

1920	Green Lane School, Eccles, UK
1922	League of Nations Official Enquiry, Geneva, Switzerland
1924	Wellesley College, Ohio, USA
1925–31	Columbia University, New York, USA (Prof. E. Thorndike)
1934–35	Public High School, New York, USA
1947–51	County Grammar School, Sheffield, UK (University of Sheffield)
1948–61	Egerton Park School, Manchester, UK
1950–63	Somero, Finland (Ministry of Education)
1962–63	Loránd University, Budapest, Hungary (Prof. I. Szerdahelyi)
1971–74	22 classes from Italy, Yugoslavia, Hungary, Bulgaria
1972–73	Scuola Elementare Dante, Forlì, Italy (Ministry of Education)
1975–77	300 pupils from Belgium, France, Germany, Greece, Netherlands
1977–83	University of Paderborn, Germany (Prof. H. Frank)
1983–88	Scuola Media, San Salvatore di Cogorno, Italy
1993	Official Report: Ministry of Education, Italy
1994–97	Monash University, Victoria, Australia (Prof. A. Bishop)

La Espero förändras

2015

La Espero i pdf-format

Under 2015 kommer vi att göra vissa förändringar med La Espero. Det som du troligen kommer att märka av mest är att vi ska endast ge ut 4 nummer nästa år. Hittills har det formellt varit 6 nummer, varav det sista har varit ett dubbelnummer, alltså 5 tidningar.

Det är tänkt att de olika numrena ska bli mera specificerade: Inför kongress, efter kongress, infonummer.

Vi kommer också att förändra loggan för att lyfta fram ”Svenska esperantotidningen” mera.

Vi vill också lyfta fram möjligheten att få LA ESPERO i pdf-format. Då får ni den i färg, något snabbare och ni sparar lite portokostnader för förbundet samt inte att förglömma – arbetet att kuvertera tidningen. Anmäl dig till mig.

På sidan 6 i detta nummer finns ett upprop till den som vill informera (mera). Ta vara på möjligheten att träffa likasinnade. Där kan ni också anmäla intresse om du vill ta del i arbetet med något specifikt nummer av La Espero.

Bengt Olof Åradsson

Kio estas inkunablo

L artikolo estis origine publikigita en tri partoj en Dia Regno numeroj 2-4 en 2013

En Mezepoko oni jam kreis librojn. Precipe monaĥoj kaligrafis ilin, ofte sur pergamen. La nomo de tiuj raraĵoj estas manuskripto. En la lasta parto de la 15-a jarcento okazis revolucia invento, oni konstruis aparaton, per kiu la homo povis maŝine fari librojn. La pres-arto estis naskita! La unuaj de tiaj produktoj ankoraŭ ne estis perfektaj. La literoj ekzemple ne ĉiuj staris rekte kaj orde sur la paĝoj, sed post 1500 la procedo fariĝis pli bona. Tiujn komencajn presaĵojn de antaŭ 1501 oni nomas "inkunabloj". En Esperanto tiu radiko unue vortare aperis en la PIV de 1970. Ĝin parole uzis en 1974 WARINGHIEN dum prelego en la UK de Hamburg.

Nun estas la demando de kie devenas "inkunablo"? En 1980 Waringhien publikigis en sia eseero "1887 kaj la sekvo ... " artikolon kun la titolo "La inkunabloj de Esperanto". Mi parte citas lin, por klarigi la etimologion de la neologismo.

... En Amsterdam vivis ĉirkaŭ la

fino de la 17-a jarcento unu libroisto; lia nomo estis Cornelisz van BEUGHEM. Tiu klerulo emis kolekti la malnovajn librojn. Spertinte, ke kun ĉiu jaro multaj el ili malaperas pro malzorgemo, bezono de brulmaterialo, incendio aŭ inundo, li entreprenis starigi liston de ĉiuj, kiujn li posedis aŭ kies ekziston li konis certe. Tiun liston li publikigis en 1688, sub la titolo *Inkunabula Typographiae* tio estas la komenciĝo de la pres-arto.

La libro havis grandan sukceson kaj iom post iom la unua vorto de la titolo estis uzata por montri malnovajn librojn, presitajn antaŭ 1501. Van Beughem elektis "incunabula" el la latina lingvo, ĉar ĝi signifas vindotukojn aŭ la unuan stadion de infano. Metafore li indikis la unuan stadion de la fenomeno "presita libro".

En la naciaj bibliotekoj de la eŭropaj landoj bibliofilo povas admiri inkunablojn en la respektiva ŝtata lingvo. Ekzemple en Nederlando gastoj estas bonvenaj en Reĝa Biblioteko en Hago, kie konserviĝas 2144 inkunabloj.

Inkunabloj en esperanto


La unuajn presitajn librojn en naciaj lingvoj oni indikas per inkunabloj. Estis la franco, Gaston Waringhien, kiu transprenis tiun nocion por la Internacia Lingvo. Li mem skribis: Ofte venis al mi la ideo, ke ankaŭ nia Esperanto povas pretendi siajn inkunablojn. Pravigon por tiu pretendo: temas pri la absoluta komenciĝo de unu lingvo, fenomeno unika en la homa historio.

Laŭ mi lia grava argumento pro la atentigo kaj okupiĝo pri inkunabloj estis la fakto, ke la libroj, naskitaj en tiuj lulil-jaroj de Esperanto fariĝis ne nur raraj sed ofte tute ne plu ekzistas. Ni prenu ekzemple la pra-broŝuron, kiun Zamenhof sendis al diversaj personoj, por konatigi sian pro-

jekton. Tiu kreaĵo ricevis poste la nomon "Unua Libro". De ĝi nun probable ne plu ekzistas unu sola ekzemplero. Petro Stojan ankoraŭ disponis unu, kiam li kompilis dum 1926-1929 sian "Bibliografion de Internacia Lingvo". Sed hodiaŭ en 2013, kie ĝi kuŝas? Almenaŭ ne en la esperantaj bibliotekoj en Vieno aŭ Rotterdam. Ni esperantistoj devas savi tiajn trezorojn. Jam temp' está. Waringhien prave rekomendis eksciti la deziron de kolektemuloj, aĉeti kaj ŝirmi la maloftajn binditaĵojn el la frua epoko de la lingvo.

En kiu periodo aperis esperantaj inkunabloj? La komenco ne starigas problemon. Zamenhof publikigis en 1887 sian manuskripton pri Esperanto. Sed ĝis kiam ni parolas pri inkunabloj? En septembro 1889 eliris la unua gazeto en nia lingvo "La Esperantisto". Zamenhof multe kontribuis al ĝi, i.a. kompilis liston kun la libroj, kiuj ĝis tiu momento estis presitaj "Nomaro de l' verkoj pri la lingvo internacia Esperanto". En tiu ĉi registro troviĝas 29 titoloj.

Waringhien proponis, ke tiun precize fiksitan serion oni indikas per inkunabloj, sekve ĉio aper-



Biblio de la jaro 1497



G. Waringhien kun la manuskripto de PIV, 1966.

inta antaŭ la 1-a de septembro 1889.

En pli posta vivofazo la franca eseisto mem elektis laŭ mia memoro novan jaron, nome 1900. Lia rekonsiderita dato ŝajnas al mi tute akceptebla fina limo, ĉar kajeroj de antaŭ tiu tempo same kiel la menciita dudeknaŭo apenaŭ nun ekzistas. La sporadaj ekzempleroj el la deknaŭa jarcento emocie instigu la interesitan samideanon, preni tiajn unikajojn en la mano. Kia peco de verdstela historio!

Inkunabloj ĉe IEI

La japana zamenhofologo Ito Kanzi, ankaŭ konata sub la pseŭdonimo Ludovikito, eldonis en 1979 la libron "La inkunabloj de Esperanto" en la serio iam kompletigota verkaro de L. L. Zamenhof.

En tiu volumo li pritraktas la esperantajn verkojn, kiuj aperis ĝis septembro 1889, tute en la spirito de Waringhien. Ito Kanzi publikigis en 1994 "Ludoviko kaj la inkunabloj"-n en la serio ludovikologia dokumentaro. En ĝi la japano jam ŝanĝis la difinon de inkunablo. Li notis, ke Waringhien iam proponis, ke ni nomu inkunabloj tiujn tekstojn, kiuj aperis antaŭ septembro 1889. Ito

Kanzi aldonis, ke tiu limigo ŝajnas al li tro mallarĝa. Li daŭrigis, mia amiko Marcel Delcourt havas la opinion, ke la inkunabloj devas ampleksi pli larĝan sferon ol tiun, proponitan de Waringhien. Ito Kanzi konsentis kun la franco kaj skribis, ni metu la finan punkton [de inkunabloj] ĉe iu peco el inter la eldonaĵoj de la 19-a jarcento.


La arĥiva fako ĉe Internacia Esperanto-Instituto (IEI) transprenis tiun penson kaj ni signas ĉiun aperintan presajojn en la lingvo Esperanto antaŭ la 1-a de januaro 1900 inkunablo. En tiu kategorio cetere ne rekte apartenas faksimiloj de la originalaĵoj el 1887-1900. Nia IEI-biblioteko posedas nur unu preskaŭ disfalintan inkunablon:

n-ro 64 Universala Vortaro de la lingvo internacia Esperanto 2-a eldono, Varsovio, Presejo de M. Weidenfeld kaj Ignacy Kelter, 1898

Ekzistas ĉe IEI aliaj antikvaĵoj, kiel el 1900

Ekzercaro de la lingvo Esperanto de L. Zamenhof, 3-a eldono, Varsovio, J. Kelter

kaj la plej unua (!) lernolibro por nederlandanoj el 1901 Internationale Taal



Esperanto, spraakkunst met woordenlijst* de Joh. C. Bruijn 3-a eldono, Amsterdam, M. Lobo Mz

Tiujn broŝurojn, produktitajn inter 1900-01-01 kaj 1917-04-14, ni ĉe IEI indikas per post-inkunabloj.

Ed Borsboom, NL

* Internacia Lingvo Esperanto, gramatiko kun vortolisto

2015

Dags att förnya medlemskapet

Estas tempo renovigi vian membrecon en SEF – kaj en la kluboj – por 2015. Se vi estas rekta membro de SEF, pagu SEK 200 al pĝ-konto 2012-3. Ne forgesu indiki vian nomon! Se vi membras en iu klubo, vi anstataŭe pagu la deciditan kotizon al la kluba kasisto.

Memoru: "Unueco donas forton!"

Vi står inför ett nytt år och det är dags för nya medlemsavgifter. SEF har kvar den gamla avgiften för direktanslutna medlemmar – 200 kr, 300 kr för familj och 100 kr för ungdom t o m 20 år. Plusgirokonto 2013–2 gäller.

Är du medlem i en klubb, så betalar du som vanligt klubbavgiften till klubben.

Kalle Kniivilä. Homoj de Putin.
Flandra Esperanto-Ligo.
Antverpeno 2014. 165 p.



En la fino de Oktobro ni legis la novaĵon ke Finnlanda ĵurio aljuĝis la premion "Kanava" por la plej bona finna nefikcia libro en tiu ĉi jaro al Kalle Kniivilä por la libro "Putinin väkeä". La libro aperis ankaŭ en la sveda kaj en Esperanto. Verkis ĝin Kalle Kniivilä en Lund, kiu estas ĵurnalisto ĉe Sydsvenska dagbladet.

"Homoj de Putin" klarigas kial Vladimir Putin estas tre populara homo kaj prezidento en Rusio, kvankam li en Okcidento estas homo, kiun multaj homoj timas. La ĉefa klarigo – kiun multaj el ni okcidentanoj forgesis – estas ke post la disfalo de Sovetio, dum la prezidanteco de Jelcin, dum multaj jaroj regis ĥaoso en la lando.

En "Homoj de Putin" Kalle Kniivilä vizitas diversajn lokojn en la lando, kaj la ĉefurbon Moskvo kaj la urbeton Ŝumerlja, kie li parolas kun ordinaraĵoj. Ili rakontas pri la relativa stabileco en Sovetio, pri la

ĥaosaj jaroj kiam multaj ne ricevis salajron kaj pri la riĉeco, kiu komencas reveni al la lando dum la periodo de Putin.

Ĉu politika libro? Ne kaj jes. Ne, ĉar ĝi ne propagandas pri la politika vidpunkto de la verkinto aŭ por iu partio. Jes, ĉar ĝi celas kompreni la vivojn kaj spertojn de ordinaraĵoj rusoj. Tial la libro estas ege valora. Ĝi estas klopodo vere kompreni tiun popolon kiu grandparte subtenas sian prezidenton. La verkinto ne juĝas, sed priskribas. Tial la libro estas leginda por ĉiu, kiu interesiĝas pri Rusio, pri politiko aŭ pri la sorto de homoj.

Leif Nordenstorm

Walter Zelazny: Ludoviko Lazaro Zamenhof. Lia pensaro, sekvoj kaj konsideroj. Bialystok/Rzeszow 2014. Översättning: Tomasz Chmielik. 190 s.

Esperantovärlden har redan från första dagen skrivit sin historia, särskilt sin idéhistoria, på ett selektivt sätt. Den hotfulla antisemitismen var ett gott skäl för detta åtminstone fram till 1945. Men också därefter har esperantisternas egen forskning om esperantos ursprung haft svårt att ta sig fram. Ivo Lapenna yttrade en gång i ett samtal att esperantos fiender förstår esperantismen bättre än esperantisterna. Jag minns också hur det var en till Sverige invandrad polsk idéhistoriker, som gjorde mig uppmärksam på Zamenhofs mycket sannolika beroende av den österrikiske sociologen Ludwig Gumplowicz' tankar. Gumplowicz har kallats den vetenskapliga sociologins grundare och hans betydelse är obestridlig. Men Zamenhof nämner honom inte. Överhuvudtaget nämner Zamenhof inte de källor han har för sitt tänkande.

Den ende esperantoskribent, som jag sett nämna Gumplowicz, är föreliggande boks författare, Walter Zelazny, forskare inom sociologi och kulturanthropologi. Han är en av dem som i nutiden

seriöst försöker kartlägga esperantos tidiga historia, speciellt den tankvärld och politiska värld, i vilken Zamenhof mötte problemen och fann sin inspiration. Zelazny är inte ensam i sin forskning. Självt nämner han Jagodzińska, Korĵenkov, Künzli, Romaniuk och Silber. Till dem kan man foga ytterligare några. Zelaznys bok är en förkortad – esperantister behöver ju ingen beskrivning av esperanto – upplaga av ett polskt original, som har utgetts av ett renommerat förlag för vetenskaplig litteratur.

Första kapitlet ägnas Zamenhofs person och de omständigheter under vilka han verkade och hur han tvingades kamuflera sina syften, något som ofta gör honom svårförståelig.

I andra kapitlet får man en fylig bild av både den politiska och kulturella historien i den breda korridor från Östersjön till Svarta Havet, där esperanto har sina ideologiska rötter.

Tredje kapitlet är det viktigaste. Dess innehåll är det hittills på vårt språk mest ambitiösa försöket att lösa gåtan Zamenhof och det ger också nycklar till att förstå praktiskt taget alla interna konflikter och spänningar i esperantovärlden, i den mån dessa inte är triviala personliga motsättningar. När man läser det kapitlet kan det också vara intressant att göra en

liten laboration, nämligen i PIV jämföra några uppslagsord, förslagsvis *franco, ruso, svedo, francismo, flandrismo* och kanske några till i samma kategori och fundera över varför definitionerna är så olika. Då kan man i bästa fall få syn på det som Zamenhof verkligen ville påverka, nämligen våra identiteter.

Fjärde kapitlet ägnas bl. a. åt interlingvistik och Ido-krisen.

Femte kapitlet behandlar esperantos anknytningar och band till religioner från wonbulism, spiritism och bahatism till Oomoto, men också dess påverkan på litteratur och filosofi och kastar slutligen en blick på begreppen finvenkism och raumism.

I det sista kapitlet knyts några teman samman, språkliga rättigheter, språken i EU, esperantos framtidsperspektiv och mycket annat.

Zelazny har använt en stor del av sin vetenskapliga karriär till att utforska Zamenhofs liv och verk och hans bok ger en stabil bas för fortsatta analyser. Den kommer förhoppningsvis göra det svårare att i framtida beskrivningar av esperanto glida tillbaka till faktafattig propaganda, myter och hagiografi.

Bertil Nilsson